Theodor Storm,

# En la arbaro

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ĉi tie ĉe l' deklivo
Mutiĝas nun la vent',
Kaj sidas sub la branĉoj
Infano en silent'.

En timian-odoro
Ŝi sidas sur la ter';
La bluaj muŝoj zumas
Kaj brilas tra l' aer'.

Silentas la arbaro,
Rigardas saĝe ŝi,
Kaj ĉirkaŭ la harbukloj
Fluadas sun-radi'.

Kukolo ridas fore;
Pensigas io min:
Ŝi havas la okulojn
De la arbar-reĝin'.

*Traduko de la Germana poemo "Im Walde" de* THEODOR STORM *(Teodoro Stormo, ∗1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

*Arg-172-344 (2004-02-22 11:32:56)*

Theodor Storm,

# Im Walde

Hier an der Bergeshalde
Verstummet ganz der Wind;
Die Zweige hängen nieder,
Darunter sitzt das Kind.

Sie sitzt in Thymiane.
Sie sitzt in lauter Duft;
Die blauen Fliegen summen
Und blitzen durch die Luft.

Es steht der Wald so schweigend,
Sie schaut so klug darein;
Um ihre braunen Locken
Hinfließt der Sonnenschein.

Der Kuckuck lacht von ferne,
Es geht mir durch den Sinn:
Sie hat die blauen Augen
Der Waldeskönigin.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* THEODOR STORM *(Teodoro Stormo, ∗1817-09-14 – †1888-07-04).*

*Arg-172-343 (2004-02-22 11:29:45)*